

DUMONATA KULTURA INFORMILO KAJ ESPRIMO

Redaktejo : Esperanto, F 47470 BEAUVILLE

Abono en Eŭropo, 1992 : 60 FF. Ekstereŭrope : 80 FF

Ĝiri al : CERCLE AMICAL ESPERANTISTE DE L'AGENAIS

P&ek : 3371 74 M Bordeaux (mencii same sur bankĉekoj!)

JEN LA 100-a, ĈU VI RIMARKIS ?

Oficiale en 1977, sed efektive jam tri jarojn antaŭe, naskiĝis nia **Laite!**

Inter organoj de E-asocioj (naciaj aŭ internaciaj) relative multaj estas tiuj, kiuj atingis tian nombron da numeroj. Sed inter la alispecaj gazetoj, t.e. tiuj, kiujn vivigas ne asocioj sed ekskluzive legantoj-abonantoj, nur malmultaj sukcesas tiel prosperi.

Por **Laite!** la kreskado estis preskaŭ seninterrompa ĝis 1990-1991 tiom laŭ la dikeco de la jarkolekto, kiom laŭ la nombro da legantoj. Nun regreso estas rimarkebla.

Iel tio estas "bonsanco" por la prizorganto, kies laborkapablo ne plu povis kreski, male... Ĉu, aliflanke, tiu evoluo ne signas modifiĝon de la emoj de la E-mondeto ĝenerale, ekzemple al pli prestiĝaj publikaĵoj, bakitaj pli profesie?

Ĉar pro sia formulo **Laite!** estas nur spegulo de tio

esprimita de la artikol-verkintoj - ja ne de redaktoro aŭ redaktistaro kun "gvidlinio" - neniam sentigis la bezono esplori ĉies dezirojn per demandilo. Ĉar cetere ĝis nun ĉiam alvenis tiom da "materialo", ke ofte necesis eldoni 100-graman (68-paĝan) bulleton por kontentigi kiel eble plej da verkintoj, ni eĉ devis pli strikte apliki la regulon malpermesantan la invadon de L! per tradukoj.

La nuna malgrasiga dieto, por ke L! ne superu 50 gramojn, respondas la trifacetan deziron ne tro malŝpari pro afranko (ni provas nun ekspedi aviadile al ekstereŭropaj abonantoj), ne tedi per tro da legmaterialo (dikaj numeroj riskas fortimigi homojn, kiuj ricevas ankaŭ multajn aliajn gazetojn) kaj - kompreneble - ŝpari ankaŭ la forton de la prizorganto, kiu malofte povas profiti de surloka helpo por la presado kaj dissendado.

Tiu eldonanto nun ŝatus prepari progresivan transdonadon de la afero al entuziasmuloj, prefere al grupo, por ke, almenaŭ tiom longe dum **Laŭte!** respondos veran bezonon por sufiĉe da interesatoj, estu plu certigata la ĝis nun ĉiam absolute regula publikigado de nia esprimito.

Kun tiuj bonvolemluloj ek al la 200-a numero!

Kristiano

TOPONIMIA TERMINARO

Aŭtoro : Lorens' Mi. Ĝi arigas la nomojn de landoj, landanoj, la toponimojn kaj regnonimojn, laŭ la modelo de la Interreta Vortaro de Ordinara Esperanto (?). Aperanta sub la aŭspicio de ILEI, tiu 12-paĝa kompilaĵo, ja tre utila, meritis pli belan grafikan aspekton. Domaĝe, ĝi estas ape-naŭ deĉifrebla per lupeo.

Liverprezo : 0,65 pundoj por ĉiu ekz-ro + 1,50 por la sendokostoj de ĉiu pakajo. Adreso : Istlia Eldonejo Esperantista, 11 Holland Park, Belfast BT5 6HB, Britio.



Pesimisme

Majo, plej bela monato en la norda hemisfero.

LOS ANGELES : stratbataloj inter blankaj kaj nigraj junuloj. 44 mortigitoj, 2000 vunditoj, kaj kiom da domoj detru-itaj?

SARAJEVO : ĉiutage estas subskribata akordo por paf-ĉeso kaj ĉiutage renoviĝas bombardadoj kaj bataloj inter Serboj kaj Bosnianoj.

AZERBAJĜANO : la neproklamita milito jam faris dek mil viktimojn, kiam la diplomatoj interkonsentis pri pac-kontrakto. Sed jam la morgaŭon rekomencigis batalado.

En multaj lokoj koviĝas sub cindro malbone estingitaj faj-roj pretaj por reekflami je ajna preteksto.

Ĉu do neniam la homoj komprenos, ke ili estas unu spe-co, kaj devas fari en konsento unu grandan rondon fami-lian?

Pro tio necesas komuna lingvo. Tion komprenis Zamen-hof, kaj tial li konstruis sian lingvon internacian. Tio estas ja necesa kondiĉo, sed ne sufiĉa (en Los Angeles ĉiuj parolas usonan-anglan lingvon). Ankaŭ tion komprenis Zamen-hof. Al tiuj esperantistoj, kiuj volis ke Esperanto estu "nur lingvo", li respondis : Necesas ke ĝin akompanu kaj inspiru interna ideo, nome idealo de interhoma frateco, kiun li nomis homaranismo. Tiun idealon li portis en si dum sia tuta vivo.

Se la homoj ĝenerale ne sentas sin homaranoj, almenaŭ ni samideanoj kulturu inter ni la internan ideon, kaj penu ĝin disvastigi.

Eĉ se senespere.

Optimisme

Fine de aprilo naskiĝis nia pranepino Maria. Ŝi estas laŭdire bela bruna bebo. La tuta familio ĝojas, inkluzive de ŝia kvinjara kuzo, mia blonda pranepo Francisko, kvankam li atendis prefere kuzeton; ĉar, li diris, "kun knabinoj oni ne povas ludi". Mi estas trankvila: post kelke da jaroj lia opinio certe aliĝos. Cetere li jam amas sian kuzineton.

Jen estas do du gepranepoj, kiuj konsistigas la novan generacion anstataŭontan la nian. Ili ekkreskas, dum ni, la gepraavoj, rapidas al baldaŭa fino.

Ĉu ili estos feliĉaj? Ni konscias, ke nia generacio ne faris ĉion necesan por sekurigi al ili glatan kaj agrablan ekzistadon. Certe ili havos kiel ni siajn zorgojn, penojn, ĉagrenojn kaj dolorojn. Ili devos lukti. Vivantoj estas luktantoj, diris Viktoro HUGO. Ili luktos, ili vivos. Kiam ili siavice proksimiĝos al la fino, kiel ni nun, ili povu diri kiel ni: Malgraŭ ĉio, entute la vivo estas bela.

Sperto de juna blindulo

Juna blindulo mi ja estas: nur dek sesmonata. En tiu tempo, kian sperton mi akiris? Ne multan.

Mi manĝas sufiĉe pure, kiam oni distranĉis la enhavon de mia telero. Tion mi devus mem fari, sed junaj servistinoj tiel spontane kaj afable plenumas tiun taskon, ke mi facilanime lasas ĝin al ili.

Mi vestas kaj senvestigas min sen ies helpo. Ĉiumatene mi lavas mian vizaĝon kaj razas mian barbon, sed mian korpon lavas kaj duŝas lertaj flegistinoj.

Mi trapaŝas en nia dulita ĉambro sufiĉe ampleksa, kie ĉiu meblo okupas difinitan lokon. Tio faciligas la palpan direktiĝon.

Ĉiutage mi marŝas po du, tri, malofte kvar kilometroj en koridoro. Tio estas teda sed sendube utila.

Mi ne provis lerni brajlon, ĉar mi konscias, ke la tuŝo-senso de miaj fingroj ne estus sufiĉe subtila.

Mi ne provis ankaŭ lerni tajpadon, ĉar se oni ne kutimiĝis al la literklavaro de skribmaŝino kiam oni estis vidanta, certe estas tre malfacile akiri tiun kutimon ne vid-

ante.

Mi estas mallerta por manipuli kasedojn en magnetofono. Ĉe la telefonaparato, kvankam la ciferklavaro estas tre oportune ordigita, mi dum longa tempo ofte eraris kaj ne sukcesis formi ĝustan voknumeron. Nun mi kutimiĝis.

Do entute malmulte da progresoj. Cetere kial lerni por progresi, kiam restas tre mallonga disponebla tempo?

En mia juneco mi konis 50-jaran blindulon, agordisto de piano, kiu havis multajn klientojn en ALESO. Li vizitadis ilin ĉiam sola, neniam hezitis pri strato, trotuaro, dompordo, tinto-ŝaltilo, etaĝo. Li marŝis rapide sur la trotuaroj, neniam koliziis kun iu aŭ io. Ŝajnis kvazaŭ li havis radaron, kiu avertus lin pri eventualaj obstakloj. Fakte liaj aŭdo-flaro-kaj tuŝo-sensoj estis mirinde efikaj. Sed li estis denaske blinda. Li disponis multajn jarojn por ekzerci siajn anstataŭajn sensojn.

Al mi kiom da tempo restas? Ĉu semajnoj, monatoj, jaro, ĉu eĉ pluraj jaroj? Ĉiaokaze ne multaj. En tiu mallonga tempo povus ankoraŭ trafi min novaj kriplaĵoj: profunda surdeco, paraliziĝo de membroj, de lango, tuta menskadukiĝo? En tiu timo mi facile inklinas al propravola ĉesigo de jam tro longa vivo. Same mia edzino, samaĝa kiel mi. Tamen tion ni ne faros pro amo al kaj de niaj geidoj.

Ni do atendas naturan morton, esperante ke ĝi venos sufiĉe baldaŭ por eviti lastan plagon.

Pri la morto ĝenerale kaj aparte pri la mia ni parolos alian fojon, se vi volas kaj se mi povos. Vi vidos: tio estas ne speciale malgaja temo.

Al niaj novaj legantoj ni memorigas ke, el la kvar aŭtobiografiaj verkoj de nia amiko VALO, restas disponeblaj:

- * **El la kara infaneco** (104 paĝoj, 15 FF)
- * **Migrante tra metioj** (112 paĝoj, 25 FF)
- * **Sepdek jaroj sub la verda stelo** (96 paĝoj, 15 FF) (10 ekz.)

Estas nun elĉerpita:

- * **Kontraŭflue.**

OKAZA RENKONTO

Estis je la komenco de la jaroj '80. Jam de sufiĉe longa tempo Pompidou-centro funkciis, kaj mi bedaŭris, ke mi ne pli ofte havis tempon por viziti ĝin, ĉefe ties bibliotekon, kies larĝaj vitraĵoj ebligis al la plej klostrofobiaj legantoj senti sin bone.

Tiun grizan aŭtunan tagon mi estis libera, kaj, pasante antaŭ la Centro, mi havis la ideon eniri. Je la 2-a etaĝo, ploroj de eŭrazia juna knabino, kiun la gardistoj intencis forpeli, altiris mian atenton.

Tiu infanino eniris tiun lokon, kie la infanoj rajtis restadi nur akompanataj. Ŝi estis leganta libron pri la grandaj transmaraj malkovroj, kiam foriranta najbarino diris kelkajn vortojn al ŝi. Ili kune iris ĝis la elirejo, kaj la knabino tute ĝoje kuris por reiri sian lokon. Kuri en biblioteko aŭ muzeo estas malkonvena ago kaj tiu estis la dua preteksto por elpeli ŝin.

Montrinte mian profesian karton, mi proponis zorgi pri ŝi ĝis mia eliro, ĉar mi havis intereson pri la sama fakto.

Post ĉirkaŭ unu horo, ni eliris kune. Ŝi klarigis al mi ke, antaŭ ekzakte unu jaron, ŝia patro reiris al norda Vjetnamio kaj neniam donis novaĵojn. Ŝia patrino estis kasistino en magazeno kaj tiun ĉi tagon revenos malfve.

Ŝi akompanis min hejmen, konatigis kun mia patrino kaj, ĉar post la tagmanĝo ni parolis pri la lernejaj libroj, mi prenis unu el miaj klaslibroj: "Le français par les textes" kaj ŝi petis min legi por ŝi la tekston kiu, laŭ mi, estas la plej bona. Senhezite, jam sciante iom pri la literaturaj gustoj de mia tute nova amikino, mi legis al ŝi, kun iom da emocio: "Le pantin de la petite Jeanne". Je la fino, ŝi ĵetis sin en miajn brakojn, kisis min sur la du vangoj kaj tuj petis permeson eliri, kvazaŭ ŝi hontis pro tio, kion ŝi aŭdacis fari. Mi eĉ neniam sciis ŝian nomon. Mi neniam revidis ŝin. Ŝi verŝajne forgesis min, sed tiu renkonto por ĉiam restos en mia memoro, same kiel la bela poemo de Teodoro de Banvilo*.

Gastono, 19-an de majo 1992.

* Théodore de Banville (Moulines 1823 - Paris 1891), franca poeto. "La pieroto de malgranda Johanino" estas eltiraĵo de "La Ekzilitoj". Temas pri memoraĵoj: la pieroto pendis de la lulilo de malsana infanino, kiu vivis nur dum unu jaro.

"NIA FRATO L'AZENO"

Se Sankta Francisko el Asizo tiel titolis sian korpon - kaj entute la homan - kun iom da tenera malestimo, pli respekte kaj scieme ĝi estis traktata de Antikveco, same de la Egiptoj, kiel de la Ĉinoj, kiuj opiniis, ke en difinitaj lokoj aperas la resuma bildo de la tuto; tial, cele al kuracado, ili uzadis tiujn diversajn "korpomapojn". Ekzemple: de jarmiloj oni plibonigas la korpan tutajon per pied- kaj manmasaĝado. Tiuj "mapoj" konsistigas iaspecajn reflektilojn, dank'al kiuj kelkaj terapeŭtoj, kapblas deĉifri nian sanstaton, ĝin plibonigonte. Tiuj korpomapojoj similas mikrokomputorojn al la centra komputoro litigitajn. Se kelkiuj pridubas la ekziston de tiuj korpomapojoj, la teknikoj ilin uzantaj disvolviĝadas kaj la pacientoj pli kaj pli decide sin turnas al ties praktikado. Ni do iom esploru la laŭvicajn piedon, orelon kaj okulon.

Kiel jam dirite, kaj Egiptoj kaj Ĉinoj la piedojn masaĝadis antaŭ pluraj jarmiloj; la sama kutimo rimarkeblas ĉe kelkaj afrikaj triboj kaj ĉe la Indianoj el Nord-Ameriko. La valoron de tia kuracado enfokusigis kuracisto Fitzgerald komence de la nuna jarcento.

La nervosistemo kaj haŭto intime ligiĝas pro la fakto, ke ambaŭ devenas de la sama embria tavolo. Sekve, haŭtmasaĝado profunde influas la nervosistemon. Sed kial aparte interesiĝi pri la piedo? Ĉar, samkiel la mano, ĝi entenas altan nombron da nervaj finoj kaj je nivelo de la cerba kortiko ĝi okupas pli gravan lokon, ol la cetero de la korpo. 70 procentojn el la korpaj malordoj kaŭzas troa nervostreĉo. Krom tio piedmasaĝado influas la sango- kaj limfocirkuladon, - ankaŭ la energifluon, eĉ se ankoraŭ ne bone konata estas ties naturo. Verukoj, kaloj kaj haŭtfendetoj signas nian ĝeneralan ekvilibron. Malvarmajn piedojn respondas malbona sangocirkulado; ŝvitemajn, glanda malekvilibro; sekhaŭtajn: ambaŭ mankoj. Post tiu ĝenerala pied-observado, post masaĝo de la tuto, la terapeŭto venas al difinitaj punktoj kaj gvatas la reagojn: tikladon, ĝenon, akran doloron... Per stimulado de tiuj bone konataj punktoj la masaĝisto helpas la pacieron sur kampo de reŭmatismoj, hemikranioj, astmo,

inaj perturboj, eĉ misdigestoj kaj hipertensio. Cetere en preventa kuracado la supre dirita tekniko povas utili. Kompreneble plibonigon oni ne ricevas en la daŭro de se-
anĉo ununura, sed eltenemo en masaĝopraktikado plifirmigas la atingajojn.

Nia orelo prezentas la desegnitajn skemon de feta korpo kapalsube. En tiu skemo ĉiu zono respondas iun el niaj diversaj korpozonoj. Niaj oreloj estas do la spegulo de niaj malsanoj kaj la enirpordoj al bonfarto kondukantaj.

Aŭrikloterapio fontas el la esploroj de Paul Nogier (kuracisto, 1951). Nenion komunan tiuj oreloj havas kun la tiel nomataj "meridianoj" de la ĉinaj akupunkturistoj. En aŭrikloterapio oni agas je la nivelo de la nervosistemo. Se ekzemple oni konstata doloron ĉe la genuo, tiel okazas, ĉar dolorporta fasko eliras el la genuo ĝis la cerbo alsupronte. Precize sub la cerba trunko, tiu fasko interkruciĝas kun la retoforma sistemo, kun la orelo rilatiganta. Tio ebligas, ke ĉi lasta ricevu diagnozocelajn informojn kaj entenu kuracajn kapablojn. Oni scipovas ekzakte lokalizi la piktuŝotan punkton. Kiam la punkto respondas trafitan korpozonojn, palpado suferigas kaj haŭtsupraĵe notindas malpliigo de la elektraj fenomenoj. Ĉar longegan tempon postulus plena palpado, nun oni faras la esplorojn pere de fidindaj aparatoj. Oni tuŝas per ege delikataj pintetoj la punkton, kiu situas ĉe la interplektiĝo de vejno, arterio, limfodukto kaj nervo. Tiamaniere oni sendas informon la doloran vojon perturbantan kaj la aŭrikloterapio fariĝas alirvojo al la centra nervosistemo. Tri fojojn el kvar oni sukcesas. Tiu kuracmetodo ampleksas ĉion al la nervosistemo rilatigantan, t.e. dolorojn (ne gravas ties deveno), hemikranioj, takikardio, mallakso, sendormo. Jen tre vasta agokampo 90 procentojn el la konsultvizitoj konsistiganta. Oni menciui ankaŭ astmon kaj psoriazon, ĉe kiuj plibonigo kalkuliĝas je 50 ĝis 70 procentoj.

Sed oni povas pritrakti ankaŭ nur psikajn problemojn. La cikatro de ĉiu grava perturbo, ĉu organ-, ĉu psiko-devena, kuŝas en la orelo. Se antaŭ 20 jaroj nia fraĉjeto forpasis, la spuro de tiu morto ne forviŝiĝis kaj povas esti, ke astmon ĝi naskis. En tia okazo aŭrikloterapio ka-

pblas samtempe reordigi la nervosisteman cirkviton kaj kuraci la postvenintan astmon. Aparte efika montriĝas la metodo por tabaka sentoksigo. La nervosistemo de senigito je tabako suferas malhavon. Jen ekaperas sur la aŭriklon sentivaj punktoj - konstante samlokaj. Oni ilin piktuŝas, ĉu per la klasikaj pikiloj, ĉu per najloformaj pintetoj ege delikataj, kiujn la subjekto konservas proksimume du semajnojn. (Ĝenerale la kuracado postulas inter 2 ĝis 4 semajnojn). Foje okazas, ke ekde la unua konsultovizito oni likvidas enradikiĝintajn problemojn.

En 1990 la Ĝenerala Direktoro de la Tutmonda Sanstata Organizaĵo rekomendis la uzadon de akupunkturo kaj aŭrikloterapio en la dispensarioj, t.e. en ĝenerala medicino. En Francio oni nun kalkulas proksimume 6000 aŭrikloterapeŭtojn.

Tre foras la origino de irisologio. La Biblio emfazas la skriktajn ligojn inter okulo kaj sanstato ekzistantajn. En la evangelio de Sankta Luko jene legeblas: "Cia okulo estas la lampo de cia korpo. Kiam cia okulo estas en bona stato, cia tuta korpo estas prilumata. Sed kiam cia okulo estas en malbona stato, cia korpo estas en la mallumo."

Nun oni scipovas legi en la iriso la plej etajn liniojn, spurojn kaj kolornuancojn por starigi sanstatan bilancon. Antaŭe irisologio kapablis ek trovi la problemojn sed ne ilin forigi; sed nun ĝi tion kapablas dank'al la eligado de ege subtilaj kolorradioj rekte sur la okulon.

Ne vere unuforma montriĝas tiu sciencobjekto, ĉar ĝi baziĝas sur diversaj teorioj, pli sinkompletigaj ol kontraŭaj. La unua mapo legadon de la sanstato ebliganta prezentas starantan homon kapalsupre kaj piedalsube, kun la korp-organoj dividitaj ambaŭflanke de la pupilo. La dekstra korpoĉefo respondas la dekstran okulon kaj inverse. Tio estas la mapo, kiun la Germanoj uzadas de la lasta jarcento. Laŭ aliaj (ekzemple Gilbert Jausas, dum la 30-aj jaroj), la homsilueto aperas inverse envolvita ĉirkaŭ la pupilo, kun retrofleksita dorso kaj la piedoj ĉe la verto.

Irisolegado liveras informojn pri la grundo, la denaskaj, hereditaj kaj korpotunkciaj malfortajoj (tiel oni povas ekevidentigi malekvilibron antaŭ ol ĝi estos plene

manifestiginta). Jen fakuloj klarigas: "En la iriso oni vidas signojn, kiuj sciigas pri nesana organo, jen la tuto." "Oni zorgu distingu ektrivon disde diagnozo." Sanstata bilanco pere de irisologio vidigas tendencojn, indikojn, signojn, perturbojn, sed plejune helpas en esplorado de la kialoj de la korpofunkciaj perturboj. Tion akcentas la germano Joseph Deck: "Nek mistika bildo, nek rebrilo de la imagopovo de l'observanto estas iriso. Ĝi estas aparte sentiva struktursignilo ĉe individuo. Samkiel ĉiu ajn difinita punkto en la homestajo, iriso estas atestanto pri ĝia tuteco."

Irisologion oni difinas, kiel energidonan medicinon. Ĝis nun temis nur pri legado de la signoj enirise skribitaj. Sed de nelonge oni scias pri la vibrokonsista naturo de tiuj signoj, pri ties enhavo kaj frekvenco. Oni kapablas tiujn signojn malkodigi. Sed se iriso emicias energidonajn signalojn, radiomesaĝojn, ĝi ankaŭ povas ilin ricevi. Kial do ne eligi rekte el ĝi subtilegajn kolorradiojn? Koloroj estas la rezulto de lumodifrakto. Tiuj radioj rolas, kiel idealaj energiportantoj. Neniam la okulon oni tuŝas, sed sur difinitajn irisopunktojn oni elsendas diverskolorajn radiojn pere de tre fajnaj optikaj fibroj.

Sed kiel difini la koloron en rilato kun ĉiu malsano? Kiel ĝin elekti? Ĉiufoje, kiam aŭrikloterapeŭto piktuŝas sentivan punkton al difinita malsano rilatantan, li observas samtempan fortan variadon de la pulsbatado. Sammaniere irisologo kutimas kontroli la pulsbatadon de sia paciento, dum li eligadas kolorradiation sur la irison. Similan variadon li konstatas en la pulsbatado; kaj laŭmezure kiel la kuracado efikas, la variado malpliigas.

Kompreneble irisologio kanceron ne pretendas kuraci, sed ĝi sukcesas ĉe inversigeblaj afekcioj: alergioj, reŭmatismoj, angoraj statoj.

Al la kontraŭuloj de tiuj laŭdire "mildaj" medicinaj oni povus rebati: kial sisteme rifuzi la helpon de teknikoj, kiuj evitigas al ni trouzadon de venenaj hemiaĵoj kaj povas plibonigi nian ĉiutagan ekvilibron?

S. BONIOL

10

POEMOJ EL USONO

Eliris ĉe la SAT-broŝurservo la poemaro "Kie brulas, ĝentlemanoj?" Jen kvindek poemoj de iu Charles Bukowski, sed kiu estas tiu Bukowski? Momenton, kara leganto de **Laŭte!**, mi tuj informos vin. Ne jam nun larĝtiru la buŝon, eble pensante, jam denove poemoj, ĉu ne estas jam nun tro da ili en Esperantio? Krome, ĉu poemoj ne estas, por diri la veron, enuiga afero? Mi konsentas al vi, kara leganto, tro da ili estas suĉitaj el la orellobo aŭ el abstraktaj idealoj almenaŭ je unu metro ŝvebantaj super la tero. Sed kio, se aŭtoro skribas pri realaj aferoj kaj sentoj? Jen povas okazi sensacio. Tia sensacio okazis en Germanio post la apero de rakontoj kaj poemoj de la usona poeto Bukowski, Bukowski nun estas granda vendosukceso en FRG kaj legata de tre diversaj popoltavoloj, kvereloj pri li ekestis, literatur-sciencistoj kondamnas aŭ faras dio lin, ĉiu junulo en Germanio almenaŭ ion aŭdis de tiu stranga poeto, kiun Sartre taksis la plej granda nunviva poeto de Usono. Sed ne nur junuloj legas lin, ja eĉ pli mirinde, tre diversaĝaj personoj legas lin kun ĝuo. Kial? Estas ne facile klarigi tion.

Jer kelkaj opinioj de diversaj germanlingvaj gazetoj kaj de aŭtoroj:

"Bukowski skribas tiel kiel Charlie Parker ludis ĵazzon."
Die Welt

"Bonvena medicino kontraŭ la sangomanka trosentivo kaj spasma enuo de la juna germana literaturo."
Stern

"Bukowski regas sian arton. Pli bone oni ne povas skribi dialogojn; pli rapide oni ne povas rakonti. Li estas rigardata momente la nova verkista mondoĉampiono en la peza klaso."
Der Spiegel

"Ĉiu linio de Bukowski estas infektita de la teroro de la usona inkubo. Li esprimas la timojn kaj agoniojn de minoritato ampleksanta centmilojn en la nenieslando inter brutala senhomiĝo kaj senpotenca malespero."
Henry Miller

"Raportoj el la ĉiutaga infero, hot-dog-baladoj, ketchup-prozo, portretoj de la kaputuloj kaj socialaj elirintoj, usonaj inkuboj. Tre brutale, tre honeste, tre apokalipse, tre komike." **Pardon**

"Lia pasio estas murdece akra, liaj rakontoj krevigas la kapdimension, ili estas utilaj al la sentoebeno, valoraj por la interna vivo sed nenio por etburĝaj seksaviduloj..." **Baster Zeitung**

Jen do kelkaj opinioj pri Charles Bukowski, sed se vi volas formi vian propran opinion, jen aĉetu la E-libron kun la 50 poemoj de li, mi elektis laŭ mia plaĉo, sed mi pensas, ke mi elektis multajn perlojn, kun la celo, ke nun ankaŭ la esperantistoj interesigantaj pri vivoplena literaturo havu okazon legi tiun poeton.

Fine ankoraŭ kelkajn informojn pri la aŭtoro mem :

Charles Bukowski, naskita je la 16-a de aŭgusto 1920 en Andernach/Rhein. Elmigrado de la familio al Usono, kiam Bukowski havis du jarojn; li plenkreskis en Los Angeles; poste en 1939/41 en la City College de L.A. ; poste en multaj diversaj laboroj kiel benzinvendisto, buĉisto, havenlaboristo, leterportisto ktp, ktp, komencis verki, kiam li estis 35-jara. Oni eldonis ĉ. 30 poemkolektojn, prozon kaj eseojn de li.

La poemojn el "Kie brulas, ĝentlemanoj?" elektis kaj el la germana esperantigis **Hagen Hirte**

Eldonis SAT-broŝurservo, 1989, 88 paĝoj, 20 FF.

Por ino, kiun mi konis

De ĉiuj ĉi feraj litoj en la paradizo
la via estis la plej frida
kaj mi estis fumo en via spegulo
kaj vi lavis vian hararon per "Jade"
vi estis virino kaj mi
knabo, sed ne tro juna
por via fera lito
kaj sufiĉe olda por la vino
kaj por vi

Nun mi estas viro
sufiĉe olda por ĉio,
kaj vi
multe pli olda
ne plu tiel
sensentas, sed via
ferlito
estas nun
vaka.

Faboj kun ajlo

Estas jam grave, ke vi skribas pri tio,
kiel vi sentas vin,
estas pli bone ol se vi
razas vin aŭ kuiras fabojn
kun ajlo. Estas la malmulto,
kion ni povas fari,
ĉi tiu eta kuraĝo klarigi
pri ni mem, kaj nature
ankaŭ frenezo kaj timo
enestas en tiu scio,
ke parto de vi
estas horlogmekanismo, kiu iam
haltos kaj ne plu restreĉeblos.
Sed nun
ĝi ankoraŭ tiktakas sub via ĉemizo,
kaj vi kirlas la fabojn
per kulero...
amatino mortas, alia for,
alia...
aĥ ! tiom da amatinoj kiom da faboj,
ja, foje nombru ilin -
malĝoje, malĝoje
kiel viaj sentoj
forbrulas sur la fornelo.
Skribu pri tio.

Morta cigno

Cignoj mortas
ankaŭ printempe
kaj tiu tie naĝis
morta sur la flanko
je dimanĉo
drivis kun la fluo
en cirklo
kaj mi iris
al la rotondo,
kaj super mi
cirkulis dioj en batal-
veturiloj, hundoj,
virinoj
kaj la morto
hastis
kiel muso
en mian kolon
kaj mi aŭdis
alveni ilin kun
siaj piknikkorboj,
kun sia ridado
kaj mi rigardis
la cignon
kaj sentis kulpa min,
kvazaŭ la morto
estus io,
por kio oni devas
honti
kaj en mia stulteco
mi foriris kaj
lasis al ili
mian mirinde belan
cignon.

ĈIES VOĈO

ĈU NI REZIGNU PRI ESPERANTO?

Esperanto ne bone fartas kaj eĉ emas malprogresi en pagipovaj landoj. La esperantistaro havas malrealistan sintenon rilate al la nuna evoluado de la mondo.

Movado eĉ lingva ne povas disvastiĝi per nuraj bonvolemoj. Oni laboru profesie por ĝia prospero, la junaj generacioj ne plu akceptas bonvolemon. Sed la idealistoj, kiuj estras la movadon, neniel volas ekrikti kun komercistoj, turismaj entreprenoj, gravaj firmaoj ktp., kiuj povus utile uzi Esperanton kaj diskonigi ĝin. Laŭ ili, Esperanto devas resti pure idealisma afero. Bone, sed la usonangla antaŭeniras grandpaŝe en la mondon, ĝi jam ne estas malproksima de la **finan venko**, parte dank'al la kolapso de la komunismo. Se la estraranoj de la movado ne kapablos trovi baldaŭan kaj efikan solvon, estas facile antaŭvidi, ke la junaj esperantistoj ĉeestos la **finan malaperon** de Esperanto. Do, mi konsilas, ke ni rezignu pri Esperanto, kiu pli kaj pli fariĝas senespera kaj senesperiga afero.

Sed, ĉar la ega plimulto de la esperantistoj estas favoraj al la ideo de **mondlingvo**, kial ne transiri al la usonangla lingvo? Certe ĝi estas pli malfacile lernebla ol Esperanto, sed :

1. Multaj homoj sur nia tergloba jam scipovas dece uzi la anglan.
2. Ekzistas nun usonangla simpligita kaj kripligita lingvo, kiu estas uzata de neanglosaksoj tutmonde.

Tiun fuŝitan lingvajon ni devus reguligi, plisimpligi laŭ kelkaj principoj de Esperanto, kaj ni povus krei societon de anglalingvaj **mondlingvanoj**. Ni verŝajne povus esti finance subtenataj de "sponsoroj" multe pli facile ol por Esperanto kaj ni havus multe pli da ŝancoj ĝisvivi la venkon de nia idealo de **mondlingvo**. Certe la angla ne estas

nature neŭtrala, sed, plisimpligita, aliigita, ĝi povus esti multe pli neŭtrala ol la pura brita aŭ usona parolmanieroj, do vere internacia. Nome, kiam Aleksandro la Granda kreis sian imperion, necesis komuna lingvo. La atika dialekto estis jam tre disvastigita ĉe Grekoj de alia parto de la lando por ke eblu interkompreniĝi, sed oni fuŝparolis kaj plisimpligis ĝin, ĉar kompreneble oni ne kapablis perfekte uzi ĝin kun ĝiaj finajoj, nuancoj, fajnaĵoj, subtilaĵoj kaj apartaj esprimmanieroj. Aleksandro oficialigis tiun fuŝe parolatan atikan lingvon kaj fariĝis el ĝi la komunan lingvon (greke : koine). La atikanoj ege malĝojis, ĉar ili devis siavice lerni fuŝe paroli sian propran lingvon por esprimi sin internacie (enkadre de la tiamamondo) kaj ili estis venkitaj per sia propra venko. Same devas kaj povas okazi por la usonangla lingvo.

Samideanoj, ni fariĝu realistoj, Esperanto jam ne povas venki kaj estas kondamnita je baldaŭa finpereo! Ni eliru el nebulaj revaĵoj kaj transiru al la usonangla lingvo. Ĝi estos la **komuna lingvo de la homaro**. Ĉu gravas, ke tiu lingvo sukcesos anstataŭ Esperanto? Mi opinias, ke ne. Se Lanti mem vivus hodiaŭ, li verŝajne konsilus alpreni la anglan lingvon. Ne gravas kiu lingvo unuigu la homaron. La universaligita angla lingvo tre bone taŭgas por tiu celo. Ni ne malŝparu tempon kaj energion por fiaskinta afero, ni akceptu saĝe kaj prudente la realon kaj la nepran superregadon de la angla. Hodiaŭ inda sennacisto kaj mondĉivitano uzas sen antaŭjuĝoj la anglan, ĉar ĝia tutmonda disvastigiteco bone kongruas kun liaj celoj. Kaj ni alinomiĝos anstataŭ SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) ni fariĝos AWO (Anational World Organization) kaj ni eldiru anglalingve nian belan devizon :

One mankind, one language


Kaj aldone, anstataŭ : SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens-, kaj agadkapablo :

- AWO membership must get accustomed to extranational ability of feeling, thinking and acting.

Por anglosaksoj tio certe estas iom fuŝa lingvo, sed tio estas, it's the new english world language.

Bye!

BORVO



Kara Esperantisto Lutermano!

Mi ne deziras alparoli ĉin per "ci", ĉar tio "malutilus ĉian sanon" ("Laŭte!" 98 p.23). Do mi devas trovi anstataŭantan vorton samsignifan, kaj tio en Esperanto (feliĉe) ne estas ebla. Sed mi povas laŭ-Fundament'ec'e formi kaj uzi vorton, kiu signifas preskaŭ la saman kiel "ci". Ĉar la sufikso "-er" indikas regulan memstaran elementon de iu ajn amaso, "viero" estas la logika (sed de mi al aliuloj neniam uzata) formo, kiun mi uzos. Notu ke mi ne deziras alparoli vieron per "vi", ĉar pro viera arogeta artikolfino mi ne povas konsideri vieron kiel pluralon, kiel homon konsistantan el pluraj personoj.

Kompreneble viera artikolo enhavas ankaŭ inteligentajn ideojn, en mia modesta opinio. Ekzemple mi trovas tre klera la eldiron "por esprimi veran intimecon, ni disponas espereble pri aliaj rimedoj ol pri la persona pronomo". Se viero estus konsekvenca, viero estus uzinta vere Esperantan vorton anstataŭ la fremda (necesita neologismo) "tenera". Sed viero tute pravus, laŭ mi, indiki ke "ci" ne utilis por montri intimecon, ĉar unue en iu ajn lingvo "ci" ne nur montras diversajn specojn de intimeco, sed ankaŭ aliajn sentojn kaj subjektivajn juĝojn, kaj due la multaj signif-nuancoj de "ci" en la diversaj lingvoj ne kongruas. Feliĉe ĉe mia uzado de "ci" kaj de "vi" tiaj miskomprenoj ne facile okazas, ĉar ĝenerale ĉiuj samopiniis ke unu (singularo) estas malsama al du ktp (pluralo). Viero notu, ke ĉe mia uzado de "ci" la vorto "vi" ne havas du signifojn, nur pluralan. Kaj, estante netrinkanto de alkoholo, mi ne ŝanĝas el "vi" al "ci" ĉe "glaso DE alkoholaĵo".

Mi trovas vieron neakceptinde subjektiva, kiam viero parolas pri la malagrablegeco de la sono "ci" dum momento de intimeco. Ĉiu lingva sono povas esti agrabla por iuj kaj malagrabla por aliiuj, certe en diversaj lingvoj, sed ankaŭ en la sama lingvo. La angla vorto por "amo" sonas malbelege laŭ nederlandaj oreloj, kaj la nederlanda vorto por "dio" sonas malĝentile laŭ anglaj oreloj, kaj eĉ ne laŭ ĉiuj. Ktp, ktp, ktp. Kaj la hundo al kiu mi diros "ci", laŭ viera proponeto (= *sugesto), certe ŝategos tiun sonon (se ĝin akompanos peco DE viando). Kaj iu virino eble ne ŝatos, se mi alparolos ŝin per la nefidebleca, hipokrita sono "vi". Pro tio, kaj ĉar viero ne estas hundo nek pluralo, mi ŝatus alparoli vieron per "ci", kion mi faras pri aliaj Esperantistoj, sed viero ne permesas min fari tion.

Kompreneble mi neniam uzas la laŭ-Fundament'ecan "viero", kvankam mi ne fanatike koleriĝus se iu Esperantisto (ne mi) uzus (ja nemiskomprenige) "viero" por "li aŭ ŝi", kaj eĉ "ili vespere apartiĝadas laŭsekse: la ŝioj dormas en unu konstruaĵo kaj la lioj en alia".

Ankaŭ kiera mi trovas vieran uzon de "alies", "aliiu" kaj "aliiam" anstataŭ la alisignifaj (kaj tre malofte uzablaj) "alies", "aliu", kaj "aliam". Cetere ankaŭ mi kutimas uzi vierajn formojn ĉirilatajn.

Por forigi eblan miskomprenon vieran, mi atentigas ke "Plena (Analiza) Gramatiko" NE estas leĝo: ĝiaj klarigoj estas nur personaj, kiaj miaj kaj vieraj, kaj ofte brile ĝustaj, nur kelkfoje eraraj, kiaj miaj kaj vieraj. La laboro necesa por verki ĝin estis grandega kaj gravega. P.I.V. estas alia problemo: duono estas klare ĝusta kun nur kelkaj (precipe gramatikaj) eraroj (eble 3 procentoj), dum la alia duono estas fremdaj vortoj, ankoraŭ ne (espereble grandparte neniam) oficialigitaj, kiujn tamen la kara gesamideanaro blinde kaj ŝafe akceptas kiel Esperantaĵojn uzindajn. Mi esperas, ke viero ne sentas vieron (sin?) "pelata hundaĉo" se anstataŭ "ci" mi uzis la belsonan vorton "viero".

Marcelo Leereveld.

AL HENRIKO KASTJO (=Henri CASTIAU)

-pantuneto-

Henriko KASTJO verkas kun vario!
En LAŬTE!, la revuo sen komparo,
li vin eltiras el la apatio:
en liaj pensoj brilas solidaro!

En LAŬTE!, la revuo sen komparo,
legeblas liaj trafikaj artikoloj,
en liaj pensoj brilas solidaro
kun la amemo de la apostoloj.

Legeblas liaj trafikaj artikoloj
kun pensoj plenaj da filantropio,
kun la amemo de la apostoloj!
Henriko KASTJO verkas kun vario!

ERGOTO DE BONAERO

IOM PLUE PRI DAMASKAJ PRUNOJ

Ĉu vi eltenos pluan nordirlandan poemon? Ne tro rapidu turni for la paĝon : ĝi temas ankaŭ (ĉefe) pri francoj kaj angloj. Povas esti eĉ, ke vi divenos, pri kiu historiisto temas. Nek Burke (irlanda) nek Carlyle (skota), certe...

Ĉar mi pri historio ankoraŭ suferas l'efikon de lerneja inokulo : irlandan historion oni instruis, sed lernolibron havis nur pri la angla - do diktoj kaj skribaĉoj, neniu povis proprajn notojn relegi. Temis tamen nur pri anglaj kampanoj, ne pri l'epoko (antaŭ jarmilo) kiam Irlando estis vere la kultura centro de Eŭropo.

Nu, jen ĝi, de Tom Paulin, el kolekto "Fivemiletown" (nomo de urbeto kvin irlandajn mejlojn for de la plej proksimaj vilaĝoj).

ANGLA VERKISTO PRI L'FRANCA REVOLUCIO

La libron li dediĉas

al du Sinjorinoj -

l'edzinoj de Sinjoroj

John Rae kaj Clive Street

"kompilis l'indekson

kaj te-regalis"

sub damaska prunarbo.

Laŭ la libro Barère

estis maldekstramana

kaj posedis malgrandan bibliotekon

de ĉina pornografio

kiun li nomis

mon cabinet noir.

Li rakontis precize l'amplekson

de l'oreltrumpeto

de Fouquier-Tinville,

argumentas ke Chénier

estis futon pli alta

ol sia frato

kaj priskribas l'operacion

al daŭfena prepucio.

Li konstruas ponton

de ni al Betelĝuzo -

ponton el damaskaj prunkernoj,

ladtrumpetoj

kaj maldekstraj testikoj.

Mi sidas sub mia vito

legante lin ĝentile.

KELKAJ RIMARKOJ

Mi konstatas, ke pli kaj pli laŭte! fariĝas vera forumo, kie ĉiuj povas esprimi tute libere siajn opiniojn pri ĉiuj temoj. Mi tre ĝojas. Estas tre grava fakto, ĉar la nunaj problemoj estas malfacile solveblaj, kaj mi opinias, ke estas tre bone, ke ĉiu povas kontribui per libera diskutado, se ne al solvo, almenaŭ al lumigo de la vojo celenda.

Pri Sovetio

La problemoj estas unuavide relative simpla. La idealo socialista-komunista teorie estas tre bona. Oni donas la potencon al la partio, kiu estas la rekta reprezentanto de la laboristoj kaj kamparanoj. Jes, sendube, sed necesas sukcesi, ke la partio kaj la registaro konsistu el honestuloj kaj kompetentuloj. Tio ne estas tiel simpla kiel ŝajnas. Estas ĉie malhonestuloj, kiuj scipovas profiti de ĉio, kaj kapabluloj ne abundas en landoj subevoluintaj. Ne sufiĉas kelkaj geniuloj, sed nepre necesas multege da kapabluloj ĉiu en sia posteno, de laboristo ĝis ŝtatestro.

En okcidentaj, evoluintaj landoj ni povas trovi facile tiujn personojn. En subevoluintaj, tio ne estas evidenta. En Sovetio, laŭ tio kion mi komprenis, pli gravis esti kompartiano ol kompetentulo. La rezulton ni vidas. Estas tre damaĝe por la Sovetianoj kaj por la tuta maldekstrularo tutmonde.

Nun oni volas kredigi al ni, ke sufiĉas apliki kapitalismajn metodojn por prosperi. Sed la kapitalisma sistemo estas priŝtelado de la malfortuloj fare de malhonestuloj, kaj sen bona organizado kaj sen kompetenteco estas mizerego por la popoloj, kiel ĉiuj povas vidi en la Tria Mondo. Pli bone por Sovetianoj, se ili estus reformintaj la difektojn de la nuna sistemo : forpeli la nekompetentulojn kaj la malhonestulojn.

Pri "ci"

Kiel Francio, mi favoras al ci-uzo. Estas ne tute racie paroli al la dua persono sen distingi inter singularo kaj pluralo kiel diris Andreo (Berte). Mi notas, ke ne nur en franca lingvo oni ci-uzas, sed ankaŭ en multaj eŭropaj lingvoj : la skandinaviaj, la germana, rusa kaj latinaj, kaj eĉ en aziaj lingvoj : malagaŝe hianao kaj hianareo, hindie tu, tum. Ekzistas ankaŭ en multaj lingvoj honoriga formo, ĝenerale la tria persono : germane Sie, itale Lei, hispane Usted, Ustedes, hindie ap. Lia moŝto estas tute spe-

ciala formo, ne uzebla komune.

Mi dubas, ĉu la katoj aŭ hundoj priatentas tiujn subtilaĵojn. Revenante el Germanio, mi deziris vidi, ĉu la hundo de miaj gepatroj fidel bone komprenis la germanan kiel la francan. Fakte, ĝi same reagis. Mi konkludis, ke fakte estas pli la tono, la sinteno, ol la paroloj kiuj gravas.

Pri riĉeco de la angla lingvo

Mi neniam diris ke la angla lingvo estas la plej vortoriĉa, pro tio ke mi ne scias tion. Mi ne povas kompari kun lingvoj, kiujn mi tute ne konas, kiel la rusa, tre riĉa laŭdire. Mi diris nur ke ĝi estas lingvo pli riĉa ol la franca (L194, p.22). Mi ne kapablas diskuti kun anglalingvulo, kiu estas senkompare pli lerta ol mi en tiu lingvo. Sed mi demandas min, ĉu li havas ideon pri la nombro da vortoj kiujn li konas kaj uzas. Kompreneble en sia gepatra lingvo oni ne bezonas uzi vortaron tre ofte, ĉar oni praktikas ĝin ĉiutage kaj oni studis en tiu lingvo. Sed por eksterlandano legi "Newsweek" aŭ "Time" aŭ eĉ "National Geographic Magazine" postulas oftan uzadon de vortaro, kaj okazas ke oni ne trovas la vorton en la vortaroj. La uzo de la vortoj estas faro de la redaktistoj. Mi ne parolas pri Ŝekspiro aŭ aliaj famaj verkistoj de la pasinto, kiuj uzis vortojn ne plu uzatajn hodiaŭ. Ĉi-okaze ne gravas, la malfacilaĵo en la angla lingvo ne estas ĝia vorttrezoro, sed la prononcado. Mi estas milionoj da eksterlandanoj en la mondo, kiuj scipovas legi la anglan, sed nenion komprenas dum kongreso, ĉe televido, ĉe kino ktp. Tial nepre necesas Esperanto, aŭ iu ajn internacia lingvo pli facile komprenebla ol la angla, kiu postulas 5 aŭ 10 jarojn da restado en anglalingva lando por esti komprenata parole.

Ekonomio kaj libereco

Mi ne konsentas kun Manceau pri pluraj punktoj kaj mi tute konsentas kun O.P. en lia respondo. Certe tiu artikolo estas tre interesa kaj estas materialo diskutinda. Mi bedaŭras, ke ĝi pritraktas tro da temoj samtempe. Mi ne volas fari elĉerpigan kritikon nun, tio postulus longan respondon, kiu bezonas multe da prepar-tempo. Kvankam la artikolo estas larĝe dokumentita kaj reflektas sufiĉe gravan laboron, ĝi entenas mankon de kritiko. Ekzemple, la aŭtoro ne provis kalkuli kiom da impostoj li pagus, se oni taksus lin je 2% el liaj posedaĵoj: verŝajne multe pli ol kion li pagas

el siaj enspezoj. Pripensu pri la valoro de la grundo kaj de la konstruaĵoj, kiu kreskas senĉese. Domo akiritas antaŭ 30 jaroj kostas almenaŭ 10-oble pli nune*. Se li luprenas domon, la posedanto pagigos al li la impostojn en la luprezo. Same la industriistoj pagigos ilin al la klientoj. Tiuj, kiuj riskas esti la viktimoj, estas la kultivistoj: ili bezonas sufiĉe ampleksajn kampojn kaj ili ricevas malgrandajn kaj hazardajn enspezojn, ĉefe se ili estas etkultivistoj.

La prezo de la butero malkreskis ne pro la afableco de la kapitalistoj, sed pro la teknikaj progresoj (bredado de pli produktokapablaj bovinoj, pli bonaj paŝtaĵoj ktp.). Finfine, estas multe da eraroj en tiu artikolo. Tio pruvas, ke ekonomio ne estas tiom facila temo. Necesas multe pristudi, pripensi, diskuti tiun temon. Ankaŭ pri konkurenco necesas pripensi la temon tute, tutmonde, ne nur en sia provinca rondo. Pensu pri japanaj kaj alilandaj kapitalistoj, kiuj investas en landoj, kie la laboro kvaŭdaŭ neniam kostas, ekzemple en Sudorienta Azio. Mi intencas skribi pli detalan kritikon, se neniu faros tion antaŭ mi, krom la jam menciita de O.P.

Pri "Ateismo egalas sak-straton"

Mi ne scias, ĉu multaj laŭtuloj kiel mi ricevis la broŝuron de Ergoto de Bonaero. Male al la kutimaj ergotaĵoj, tiu estas multe pli klara. Ne estas tamen pli racia. Tio komenciĝas per artikolo de Aunis jam aperinta en L! n-ro 90 "La stulteco de ateismo". Al tiu mi respondos: Ne la ateistoj inventis la diojn. Ili nur neas iliajn ekzistojn. Krome tiuj dioj estas ĉiuj mutaj. Se oni pristudas la demandon, oni ekvidas ke religioj fontas unu el la alia. Ekzemple, komparu hinduismajn ritojn (5000 jarojn) kun katolikaj (2000 jarojn). Mi trovas strange, ke oni ĉiam referencu primitivajn, pralogikajn pensmanierojn najbare al la jaro 2000. Dum sciencoj mirinde progresas, la religioj gurdas ĉiam la samajn primitivajn dirojn kaj farojn. Ili rifuzas sisteme racion, kritikon ktp. Ili enmuriĝas en tre antikvaj pensmanieroj de antaŭ 5000 aŭ 8000 jaroj. Ili lokas sciencojn samnivele kiel la plej primitivaj konceptoj. Ĉu tio estas saĝo? Fakte, ke Dio aŭ dioj ekzistas aŭ ne, tute ne gravas.

Mi aldonas anekdoton. Kiam Buonaparte, tiam Ĉefkonsulo, miris pro tio ke Laplaso (Laplace), fama sciencisto, ne menciis Dion en sia verko pri ĉiela mekaniko, Laplace respondis: "Civitano, mi ne bezonas tiun hipotezon". Jen la finvortoj: en la sciencoj

ni ne bezonas la dian hipotezon. La sciencoj progresas sen ĝi.

* Se vi kalkulas laŭ la formulo de akumuliganta rento, vi havas :
(1,02)³⁵ = 1,990. Tio signifas, ke post 35 jaroj la komenca prezo estos repagita tra la impostoj. Fakte, estus multe pli rapide, ĉar intertempe la prezo de la varo estas multobligata per 10 aŭ pli. Jen konkreta ekzemplo : Mia patro konstruigis domon en la ĉirkaŭaĵo de Parizo en 1921 kun kosto 20 000 FF pruntedonita de la ŝtato. Li bone prizorgis ĝin kaj je lia morto en decembro 1983 la domo kun la ĝardeno estis taksata je 500 000 FF. Tiam li devus pagi 500 000 x 0,02 = 10 000 FF jare kiel takson, dum li ricevis pension je proksimume 8 000 FF monate. Eĉ se li ricevus 4 000 FF kiel pension, li devus pagi la saman imposton.

J. DEKER

ANKORAŬFOJE PRI ŜIRMO DE MEDIO

Ŝirmo de medio, tio estas temo tre aktuala nuntempe. Malfacile estas ne memori ĝin en **Laŭte!**

Ĉefaj minacaĵoj por nia mondo estas : "acidaj pluvoj", ozonaj truoj kaj malpurigo de natura medio. Por ĉiu problemo mi oferas iomete da tempo por priskribi ĝin.

"Acidaj pluvoj".

Unuafoje oni notis ilin en 1950-aj jaroj en Nederlando, Belgio kaj Luksemburgio. Hodiaŭ gutoj de "acida pluvo" falas sur ĉiujn regionojn de norda globduono. Malrapide ili margaĉas marmoron de prezaj kaj historiaj konstruaĵoj. Ili difektas akvon, ekvenenas grundojn. Ili fontas el gasoj enkondukitaj al atmosfero : SO₂, NO.

Dua problemo estas ozonaj truoj.

Ozono ĉirkaŭas la teran globon alte 10-50 kilometrojn, plenumas rolon de ŝirmo kontraŭ malutila agajo de sunaj radioj. Bedaŭrinde la tavolo de ozono malgrandiĝas pro gasoj, ĉefe freonaj |12 (CCL2 F2)| - kemia simbolo, kiuj estas konsistaĵoj de multaj kosmeĉikaĵoj kaj estas uzataj kiel gasoj en aerosoloj. La produktado de la gasoj superas jare miliardon da kilogramoj. Pro ozonaj truoj ĉiujare pligrandiĝas la tumoroj de haŭto.

Lasta minaco estas la malpurigo de la natura medio.

Kamentubaj fumo, kemiaĵoj, defalaĵoj, defluoj, tio es-

tas nur kelkaj ekzemploj. Ni eĉ ne scias, kiel ofte ni konsumas produktojn farĉitajn per diversaj venenoj. Oni enkondukis diversajn malpermesojn, inter aliaj kontraŭ defeto de nafto kaj oleoj al maroj, dronigo de kemiaj substancoj kaj industriaj defalaĵoj. Oni prilaboris speciojn de riveroj ĝis nun nemalpurigitaj, registrojn de defluoj...

De komenco la homo interkomunikigas kun naturo, sed kion ni faras por ĝi?

Ni memoru : "Naturo povas ekzisti sen homo, sed homo ne povas vivi sen naturo."

Remigiusz GRZELA, PL.

KONTRASTO

Probable ĉi tiu artikoleto ne estas konvena por **Laŭte!**, ĉar inter la laŭtularo abundas - mi supozas - la monistoj (sendiuloj) kiel monisto estis Lanti. Sed gelaŭtuloj estas toleremaj.

Ankaŭ mi ne kredas al tiu "dio", kiun prezentas al ni la Biblio. Tiu "dio" havas la sentojn kaj pasiojn de la homoj. Li amas, malamas, plej kruela venĝas ktp.

Aldone, per la vortoj, kiujn homoj atribuas al tiu "dio", nia planedeto Tero estas la centro de la Universo kaj ni, homoj, la fokuso de tiu Universo.

Permesu al mi do ridi : Ha! ha! ha!

Pensu, ke estas en la Universo miliardoj da steloj kaj ni, "hometoj" povas esti la mastroj de ĉio tio...?

Permesu al mi denove ridi : Ha! ha! ha!

Tamen... Tamen mi firme kredas, ke la Universo - en kiu la planedeto, kiun ni homoj nomas Tero, estas apenaŭ ereto - ne estas hazardaĵo. Malantaŭ ĝi estas iu Volo, kies grandiozecon ni ne kapblas, ne povas kompreni.

Tiu Volo, tiu Grandiozececo kelkfoje okazigas aferojn, kiujn oni povas konsideri kvazaŭ ŝercojn. Ŝajne li deziras priridi la homon, la malfortan homon, kiu sin kredas la centro de ĉio.

Bonvolu do legi atente kaj mediti poste.

Jam preskaŭ 600 jaroj da kristanismo. Al viroj kaj virinoj estis predikata la aŝketismo kaj la neado de la sekso. La plej alta kvalito de kristanoj estis resti virgaj.

Sed jen en Arabio, en la jaro 570-a, venis al la vivo iu viro nomita Muhammad, filo de Abdulla kaj Amina, kaj plej konata inter

ni kiel Mahomedo.

Tiu eksterordinara viro, kiam li estis 40-jara, nome ĉirkaŭ la jaro 610-a, komencis sian predikadon kaj post bataloj kaj bataletoj li povis starigi grandan religion: islamismo, kiu baldaŭ konkurenkis - kaj je la komenco venke - kontraŭ kristanismo. Islamismo estas ankoraŭ ĉe ni, viva kaj forta. Pli ol 250 milionoj da homoj praktikas ĝin.

Kaj la adeptoj de islamismo abunde uzas sekson kaj tiagrade ke Mahomedo mem havis 11 edzinojn kaj kelkajn filojn. Granda la kontrasto, ĉu?

A. Lopez Luna



LETERO EL FILIPINIO

"... Ĝus revenis elektra lumo, kaj mi volas uzi la tempon ĝis nova paneo. Lastatempe ĉi tie oni tre ofte paneigas elektran kurenton, alterne tra la tuta lando. Versajne oni tiel volas moligi reziston de la popolo kontraŭ finkonstruo de atomcentralo en Bataan, apenaŭ 50 km-ojn de la vulkano Pinatubo,

kiu pasintjare terurigis la homojn per tertremoj kaj erupcioj. Vulkancindro flugis plurfoje eĉ ĝis la ĉefurbo Manila, kiu troviĝas pli ol 100 km-ojn for de Monto Pinatubo, kaj kovris stratojn kaj tegmentojn per sufiĉe dika tavolo da erupciaĵo. La sinsekvaj erupcioj kaŭzis i.a., ke Usono daŭre forlasis sian militbazon en Clark Fields, inter 20 - 30 km sudoriente de la erupciejo, kaj estis kundecido por tio, ke Usono nun forlasis ankaŭ la maran militbazon en Subic Bai, ĉ. 50 km-ojn sude de la vulkano. Certe ne estas domaĝe, ke foriĝas militbazoj, tamen por la regiono tio havas gravajn ekonomiajn sekvojn, des pli, ĉar la erupcioj de Pinatubo kaŭzis multajn damaĝojn ĉi tie. Politikistoj nun promesas konstrui en Subic Bai internacian havencentron kompareblan kun Singaporo aŭ Hongkongo. En la popolo oni jam ekdemandas, de kie ili volas preni la monon por tio.

Ĉar en majo estos balotoj, politikistoj fervore provas superi unuj la aliajn en promesoj pri prosperigo de la ekonomia situacio en la lando. Iuj politikistoj ŝajnas kredi, ke ĉiuj homoj en la lando estas stultaj ŝafoj. Bonega ekzemplo estis publika diskuto inter la nuna vicprezidanto, S-ro Laurel, kaj la registara parolisto, S-ro Mitras, kiun mi povis sekvi antaŭ nelonge ĉe televido. Ambaŭ kandidatas por la ofico de ŝtatprezidanto, en la elektoj de majo. S-ro Laurel, estinta vicprezidanto dum la pasintaj 6 jaroj kaj daŭre en ofico, ne hontis akre polemiki kontraŭ sia propra registaro. Sin mem li senkulpigis asertante, ke nur la prezidantino, S-ino Aquino, kune kun la parolisto, S-ro Mitras (tiel!) solaj havis kaj uzis la potencon, dum li mem, la vicprezidanto, estis nur speco de spektanto. Mi trovis tion stranga, ĉar mi opinias, ke vicprezidanto estas kunrespondeca pri la politiko de la registaro. Li ja havis dum la pasintaj 6 jaroj sufiĉe da tempo por protesti, kaj por deklari sian demision, se li ne volas transpreni respondecon. Oni respondis al mi, ke lia konduto tute ne estas eksterordinara. Li ja ne volis rezigni pri la lukra monfonto en la registaro - tio pli gravas ol honoro kaj respondeco. Fakte, la prezidantino, S-ino Aquino, jam ofte kritikis sian vicprezidanton, "ke li pli ofte vidigis en golf-ludejo ol en siaj registaraj oficoj". Ŝi eĉ provis pro tio maldungi lin, sed evidente ŝia povo ne estis tiel forta, kiel Laurel asertas, ĉar ŝi ne povis efektiviigi la maldungon.

Okaze de kampanjo por elekto antaŭ kelkaj tagoj mi havis okazon vidi alian kandidaton, s-inon Imelda Marcos, la fifaman edzinon de la fifama diktatoro Fernando Marcos, el distanco de apenaŭ duona metro. Mi staris antaŭ nia domo en Manila, kiam pretervenis ŝia aŭtobuseto. S-ino Marcos staris ĉe la fenestro kaj etendis ambaŭ siajn brakojn por skui la manojn de la spektantoj surstrate, dum grupo de spektantoj jam ekskandis "maganakaw 't asasin" (ŝtelisto kaj murdisto). Konatoj diris al mi, ke Fernando Marcos estis bona en la unua tempo de sia prezidanteco. Sed lia edzino, eksfilmaktorino, estis elspezema kaj ege

malŝparema, tiel ke la kutima salajro de ŝtatprezidanto ne sufiĉis por ŝiaj ambicioj kaj pretendoj. Unu ekzemplo pri ŝia malŝparemo: post la ekziliĝo de geedzoj Marcos en 1986 oni trovis en la privata loĝejo de Imelda Marcos, i.a., proksimume 4000 (kvar mil) paroĵn da ŝuoj - dum grandparto de la civitanoj vivis en mizero. Kaj nun tiu sinjorino ne hontas kandidati por la ofico de ŝtatprezidanto. Mi rifuzis skui la manon de tiu persono, sed ŝi forte manpremis mian edzinon. Ankoraŭ du tagojn poste la mano de mia edzino odoraĉis de aĉa parfumo kaj ŝvitaĵo de S-ino Marcos. Mia edzino klarigis al mi, ke tio estas "ŝenel fajvo". Mi respondis, ke la parfumo venas el Francio, do oni devas prononci france "Chanel cinq" (c. kvin). La aŭskultantaj gefamilianoj kaj geamikoj nun provis tion, sed ilia prononco pli similas al "Chanel sang" (c. sango). Ironio en malfacilaĵoj de prononcado...

Post kuraco de mia kruro ni flugis al Cebu, la dua urbo en Filipino, laŭ nombro da loĝantaro, ĉ. 500 km-ojn sude de Manila. Ĉar nia 3-jara filino estas tre vigla, mia edzino petis sian pli aĝan fratinton, Florinda, akompani nin. Florinda estis tre fiera kaj feliĉa, ĉar tio estis ŝia unua flugo en aviadilo. La flugo ja kostis malpli ol samdistanca vojaĝo per fervojo en Germanio! Niaj amikoj en Cebu informis nin anticipe, ke taksio de la flughaveno ĝis la urba centro kostas ĉ. 75 pesojn (3 USD). Ĉe la flughaveno ĉiuj taksioŝoforoj, ekvidinte min, insistis pri fiksprezoj inter 200 kaj 300 pesoj (!). Mia edzino siaflanke insistis pri uzo de la taksimetro, tial pluraj ŝoforoj rifuzis transporti nin. Finfine ni pagis 68 pesojn. Gastigis nin la frato de iama korespondamikino mia, kiu intertempe edziniĝis en Germanio. La frato kaj lia edzino, ambaŭ diplomitaj ekonomistoj, havas kune agentejon pri perado de ŝipŝarĝoj. Antaŭ 3 jaroj ili povis aĉeti domon en t.n. gardita vilaĝo, interne de la urbo. Kiam ni alvenis ĉe la enirejo de tiu vilaĝo, ni estis salutataj de kelkaj gardistoj armitaj per maŝinpistoloj. Ili enlasas nur fidindajn personojn. La tuta vilaĝo estas ĉirkaŭita per alta muro. Oni pensis sin en mezepoka urbo; sed

domoj, aŭtoj, la pordeĝaj gardistoj ja aspektas pli modernaj. Armitajn gardistojn oni trovas en Filipino multnombro, precipe ĉe publikaj konstruaĵoj, magazenejoj kaj bankoj. Se vi volas eniri magazinon, gardistoj esploras vin, ĉu vi ne kunportas pafilojn aŭ bombojn. Eĉ pli severaj estas la kontroloj ĉe bankoj. Tial oni aŭdas nur tre malofte pri bankrabo en Filipino. Kaj se vi volas eniri publikan konstruaĵon, vi devas deponi pasporton aŭ iun validan identigilon ĉe la enirejo; alikaze oni ne lasas vin eniri.

Ni vizitis ankaŭ la gepatrojn de mia amikino, kiuj loĝis en dometo ĉe la urba rando, kiam mi vizitis ilin antaŭ 6 jaroj. La bofilo, kiu estas konstrufaka inĝeniero en Germanio, ebligis konstrui sur la sama loko domon sufiĉe belan por tieaj cirkonstancoj. Lastatempe oni vidas pli kaj pli multajn novajn domojn en Filipino. Ofte ili estas financitaj de elmigrintoj. Multaj filipinanoj elmigras eksterlanden por trovi pli bonajn laborkondiĉojn. Preferataj landoj estas Usono, Kanado kaj Saŭdi-Arabio; multajn filipinajn gelaboristojn oni trovas ankaŭ en Hongkongo, Singaporo, Tajvano, Koreio, Libio, Aŭstralio kaj Japanio. La Eŭropa Unio fermis la pordojn por ili jam de 20 jaroj. Tamen ekzemple en Germanio, kaj laŭ mia scio ankaŭ en Italio, multaj filipinanoj laboras kaŝe sen laborpermeso. Mi konis filipinan laboriston, kiu havigis al si ĉiun trian monaton novan pasporton per helpo de konatoj en Filipino, tiel li povis pruvi okaze de kontroloj, ke li estas nur turisto, kiu ja rajtis ĝis antaŭ nelonge resti 3 monatojn en Germanio sen vizo. Intertempe oni postulas vizon ankaŭ de turistoj. Mia konato venis en polican kontrolon, kaj oni tuj ellandigis lin.

Nun mi vojaĝis al la provinco Pangasinan, ĉ. 200 km-ojn norde de Manila. Post 5-hora vojaĝo en plena aŭtobuso ni atingis nian celon, urbon Sankta Barbara. Survoje ni preterpasis monton Pinatubo. La pejzaĝo ĉirkaŭ ĝi, antaŭe verda, fruktodona lando, nun similis dezerton. Ĉion kovras griza cindro, kelkloke la cindrotavolo estas kelkajn metrojn dika. Foje ni devis traveturi riveron, ĉar la ponto estis anko-

raŭ detruita. Oni diris, ke tio ja eblas nur dum la seka periodo. Ekde junio, kiam komenciĝas la pluvsezono, ne plu eblos traveturi la riveron. Per miloj da sablosakoj oni jam konstruis provizorajn ponto-kapojn ambaŭflanke, kaj ekkonstruas provizoran ponton el militista materialo. Per diversaj raŭpmaŝinoj oni tie klopodis ankaŭ forigi la cindron el la rivera lito, prevento por la venonta pluvsezono. En tiu loko multaj almozpetantaj infanoj atendis la preterpasantajn aŭtobusojn. Ili havis longajn stangojn, ĉe kies pinto ili fiksis saketon. Tiel ili povis atingi la fenestrojn de la aŭtobusoj, sed la vojaĝantoj, plejparte mem tute ne riĉaj, donis nur malofte kelkajn centavojn. La pli riĉaj homoj vojaĝas per "aircond-busoj" (aŭtobusoj kun malhejta instalaĵo), kies fenestroj estas hermetike fermitaj, tiel ke almozpetantoj ne povas atingi la vojaĝantojn. Kelkajn kilometrojn poste, apud urbo Tarlac, mi vidis grandan ruĝkrucan tendovilaĝon por viktimoj de la vulkano. Mi provis imagi, kiel la suno el preskaŭ zenito brulas sur la tendojn, kaj kia temperaturo regas interne dumtage. Sta Barbara estas je 20 km. de la provinca ĉefurbo Lingayen, kaj 10 km de grandurbo Dagupan. De la bushaltejo ĝis la loĝejo de niaj parencoj, en kampara antaŭurbo de Sta Barbara, ni veturis per rikiŝo, kiun oni nomas ĉi tie tutsimple "triciklo". Ĝi konsistas el malpeza motorciklo, kun flanka kabino por du ne tro dikaj pasaĝeroj. Tria pasaĝero povas sidi malantaŭ la veturigisto. Ofte okazas tamen ke pliaj pasaĝeroj volas kunveturi, kiuj tiam staras je flanko, malantaŭe, kaj ie ajn, kie estas la tenilo. La maksimumo, kiun mi vidis, estis 14 personoj sur unu triciklo!

La domo estas iom pli "komforta" ol la kutimaj domoj de kamparanoj kaj kamplaboristoj. Ĝi estas duetaĝa. La unua etaĝo estas konstruita el ŝtonoj, la dua el lignotrabo kaj bretoj, parte el bambuplektaĵo. El la teretaĝo oni suprengrimpas per ŝtupareto el bambustangoj al la dua etaĝo. La planko de la supra etaĝo, samtempe plafono de la teretaĝo, estas farita el mallarĝaj bambustrioj najlitaj sur kelkaj maldikaj traboj. Kiam mi la unuan fojon surpaŝis

tiuspecan plankon, mi timis ke ĝi rompiĝos kaj mi falos malsupren. Tamen la tiuspecaj plankoj estas mirinde solidaj - se la traboj ne jam estas roditaj de termitoj kaj lignovermoj - bedaŭrinde regula fenomeno en ĉi tiu regiono. La ondlada tegmento samtempe estas la plafono de la supra etaĝo. Ĉirkaŭ la domo estas vasta ĝardeno, kun multspeciaj arboj kaj arbus-toj, plejparte bananujoj, mangujoj kaj kelkaj kajujoj kaj kokospalmoj. Vera vidindaĵo estas la kuir-ejo. En sufiĉe granda aperturo de la muro oni aranĝis laborsurfacon el strioj tranĉitaj el bambuo, simile al la planko de la supra etaĝo. Sub ĝi estas akvodefluejo. Sur ĝi staras la diversaj kuirreĵaj ekipaĵoj, i.a. du argilaj fornetoj, pli bone ujoj por fari fajron en ili kaj starigi kuirpoton sur la fajron. Super la kuirangulo estas denove bambustrioj aranĝitaj kvazaŭ tegmento, same estas ankaŭ la vando eksteren aranĝita. Tiel la fumo facile povas eliri - se la vento venas el la ĝusta direkto. La kuiranta virino uzas longan tubon, el bambuo aŭ el fero, por blovi la fajron, per la buŝo. Uzitan akvon oni simple elverŝas sur la labortablon; ĝi fluas tra la bambustrioj en la defluejon. Ĉi-lasto kondukas eksteren en la ĝardenon, kie aparte densaj plantoj jam sorbas la akvon. Biologia kloakakva purigejo.

Alian tagon ni luis "ĵipnion" kaj veturis kun la tuta familio (20 personoj) al la marbordo proksime de Dagupan. Ĵipnio estas veturilo en la stilo de ĵipo, sed iom pli longa, kun po unu sidbenko ĉe ĉiu flanko, kiuj kune donas lokon por 14-16 personoj. Apud la ŝoforo estas loko por 2 pliaj personoj. Du personoj povas stari ambaŭflanke de la ŝoforo sur la piedbretoj, kaj ankaŭ sur la poupaj piedbretoj foje staras 4-5 personoj. La ĵipnio estas la plej ofte uzata publika trafikilo en trafiko enurba aŭ inter najbaraj urboj aŭ vilaĝoj en Filipino. Sur la stratoj de Manila dense premiĝas miloj da ili. Per ili oni povas atingi, je malalta tarifo kaj sen longa atendado, preskaŭ ĉiun lokon en la urbo. Mia bofrato diris, ke ĉe la marbordo ni povas liri apartan strandkabanon (4 fostoĵ kun palmfolia tegmento, interne 2

tabloj kaj benkoj, ĝuste por ni 20 personoj, por 20 pesoj = 0,80 USD). Sed kiam oni ekvidis min, oni postulis 50 pesojn. Miaj akompanantoj rezignis, sed ni decidis resti en la ĵipnio. Post kvaronhoru la ludon-antino revenis kaj ofertis la Kabanon nun por 30 pesoj. Ĉi-foje ni akceptis. Tiaj prezdiferencoj ŝajne estas tute normalaj ĉi tie. Tial mi ĉiam apartiĝas, se mi iras kun mia edzino al fciro, kaj observas la scenon el nesuspektiga distanco. Se mi estus kun mia edzino, ni certe pagus la duoblon aŭ eĉ pli. Mi testis tion, demandante ĉe diversaj standoj pri la prezoj, kaj mia edzino aĉetis la samajn varojn kelkajn minutojn antaŭe aŭ poste je konsiderinde malpli alta prezo. Cetere, pri la tago ĉe la marbordo ankoraŭ dolore memorigas min sufiĉe akre brulvundita dorso. Tio, kvankam mi estis singarda kaj serĉis pli ofte la ombron de la kabano ol la sablejon aŭ la akvon. La sablo ja estis jam matene je la 9a tiel varmega, ke ne eblis surpaŝi ĝin per nudaj piedoj. Tre taŭgaj estas la simplaj, malfermitaj sandaloj, kiujn oni kutime portas ĉi tie, kaj da kiuj ankaŭ mi aĉetis paron. Pli ol mi suferas mia edzino pro la sunbrulo. Ŝi kredis eskapi la sunan varmegon restante dum horoj en la akvo. Malgraŭ sia flavbruna haŭto ŝi suferas multe pli ol mi kun mia preskaŭ senpigmenta, tre hela haŭto.

Lingvaj problemoj ne tute indulgis nin. La plej aĝa frato de mia edzino parolas nur pangasinanan lingvon. Li ne scipovas tagalan, nek anglan, nek Esperanton. Mia edzino nur iomete balbutas pangasinanan lingvon, ŝia gepatra lingvo estas la tagala. Mia bopatro devenas el Pangasinano, kie naskiĝis la plej aĝa frato de mia edzino. Post la morto de sia edzino mia bopatro transloĝiĝis al Manila, kie li denove edzigis. Tie naskiĝis ankaŭ mia edzino. La plej aĝa frato de mia edzino daŭre restis en Pangasinano, kie li prilaboradis la grundon de siaj gepatroj por sin mem vivteni. Tiel povas okazi, ke gefratoj el la sama familio ne povas interkompreniĝi.

Post kelkaj tagoj nia restado en Filipino finigis, kaj mi devos reiri al mia kutima laboro..."

Manfredo

JESUO-KRISTO SUFIĈE KONATA NUN DE MI

Mi aŭdadis multon pri Jesuo Kristo. Oni rakontadas, ke li estas perfekta homo, filo de Dio (laŭ iuj), kaj Dio mem (laŭ aliaj). Mi lernejanigis en elementa lernejo katolika. Mi estis devigata esti katolika : mi baptiĝis en 1970, dek tri jarojn post mia naskiĝo. Jesuo Kristo estas Sankta Persono, kiun oni devas ne invoki, eĉ ne alvoki kaj elvoki. Miaj pliaj paŝoj en Kristanismo malkovrigis al mi, ke tiu Jesuo savis/savas la homojn, mortinte sur la kruco. Mi pensis, ke Jesuo estas vere eksterordinare perfekta homo. Mi respektis lin.

Kun la naskiĝo de demokratio en mia lando, Jesuon mi nun perfekte konas, danke al la nacia konferenco Togolanda. Kiel nacia konferenco, politikajo povis konigi Jesuon, religiulon? Ĉu religio kaj politiko povas esti kune? Ni vidu!

EYADEMA estas la nuna prezidento de Togolando. Li rabis la prezidentan seĝon post puĉoj, kiujn li kaj aliaj soldatoj sukcesis en 1967 komplete kun la tiama registaro Francia. De lia ekregado ĝis la eko de la jaro 1990 lin la religiuloj ege omaĝis. Precipe la episkoparo Togolanda tiom laŭdegis lin, ke oni komparadis lin kun Kristo. La ĉefepiskopo de Lome, DOSSEH-ANYRON ROBERT-CASIMIR TOGNUI gvidadis mesojn kun festoj ŝtataj kaj kristnaskaj. La homilioj de la episkopo tute priskribas la personecon de EYADEMA. Li parolas pri la savado far KRISTO de la homoj. Tiel ankaŭ li sciigas la savadon de Togolando far EYADEMA. Li kredigas, ke EYADEMA estas ĝuste la mesio de la 20a jarcento, kiu semadas pacon ne nur en Togolando, sed ankaŭ en aliaj partoj de la mondo.

Ĉu la episkopo, kiu sufiĉe bone konas ambaŭ homojn, povus mensogi? La prezidento EYADEMA tiom apoteozigis, ke Togolando elvokadis lin por helpi ĝin solvi ĝiajn problemojn. EYADEMA vere fariĝis la Togolanda DIO, kaj dum la okdekaj jaroj li akaparis la tutan landon, kiun li utiligadis siaplaĉe.

Kaj la orienta vento atingis Afrikon. Ankaŭ Togolando skuiĝis. La tumultoj ekis en oktobro 1990, kiam la diktatoro volis kondamni senkulpulojn. Tiam voĉoj de la popolo

ascendis ege forte por montri la malkontentigon de la Togolandanoj pri tiu decido de la prezidento. Sekvis poste multaj manifestacioj, per kiuj la popolo postulis, ke okazu nacia konferenco. EYADEMA tre longe spitis la popolon, antaŭ ol akcepti la organizadon de la nacia konvento politika. Ĉiuj scias nun pri la masakroj, kiujn sekvis tiu konvento : la armeo Togolanda amase buĉis pacemajn civitanojn. Tamen la konferenco povis okazi. Tiu renkontiĝejo de ĉiuj tavoloj de la Togolanda popolo malkovrigis la personon EYADEMA, do ankaŭ JESUOn KRISTOn.

En 1963 EYADEMA, komplice kun la tiama registaro de Francio, mortpafis la unuan ŝtatestron OLYMPIO de Togolando. En 1967 li renversis la registaron de la dua prezidento GRUNITZKY de Togolando, kiu estis gvidinta la landon marionete laŭ la decidoj de la Togolanda armeo gvidata de EYADEMA. En januaro 1967 kolonelo DADJO transprenis la povon, sed kvar monatojn poste EYADEMA renversis la kolonelon, kaj la tutan povon akaparis. El la buntaj komunikoj de la konferenco oni povis kapti, ke :

- La kason de la ŝtato malplenigis la registaro,
- La registoj kokradis la regatojn,
- La ŝtatestro starigis koncentrejojn tra la lando, kie li torturadis,
- La prezidento arbitre malliberigas,
- Li igis la landon propraĵo de sia gento,
- Li ribeligis iujn togolandanojn kontraŭ la aliajn (dividi por regi),
- Li mortigadis homojn, kiuj volis enŝoviĝi en politikajn aferojn sen kompliciĝi al li, ktp.

Tiuj faroj de EYADEMA tiom misfamigis lin, ke neniu vera homo en la lando havas plu estimon por li. Preskaŭ ĉiuj postulas lian demision. Kelkaj homoj eĉ volas vengi pro la malbonoj, kiujn li kaŭzis al ili.

Jen do la karakteroj de EYADEMA, kiu laŭ la sutanulo egalas Kriston. La ĉefepiskopo estas la ĝusta persono, kiu tre bone konas la politikulon kaj la religiulon. Li scias tre bone, ke Jesuo oni mortigis : ĉu pro aferoj similaj al tiuj de EYADEMA?

JES, MI NUN KOMPRENAS.

Jesuon mi nun konas, ĉar lian egalulon mi nun sufiĉe bone konas. Mi nun komprenas, kial Kristo ĉiam iradis

kun Maria Magdalena. Mi scias nun kial li amikiĝis kun Judas Iskariot. Mi vidas nun kial Dio ne respondis lian alvokon : "Eli, Eli, Lamasabahtani".

Jesuo nun venĝas kontraŭ la ĉefepiskopo, ĉar la frokulo denuncis lin. Tial Jesuo aperis en sono al la ĉefepiskopo, kiun li severe admonis. Timante, la ĉefepiskopo liveros pliajn sekretojn liajn. Li minace postulis lian demision, kiun la papo aprobis.

La ĉefepiskopo ne plu estas la estro de la katolika eklezio Togolanda. Li ekzigis antaŭ la 13a de februaro 1992, kaj estis de papo Johano Paŭlo II anstataŭigita per ĉefpastro.

GBEGLO Koffi

AL SIMONA BONIOLO (=Simone BONIOL)

-pantuneto-

Simon' BONJOLO: trafa debutanto!
En LAŬTE!, la revuo sen komparo,
ekverkis ŝi en fajna Esperanto:
ŝi sian sorĉon disdonas sen avaro!

En LAŬTE!, la revuo sen komparo,
jen estas ŝiaj versoj, ŝia prozo,
ŝi sian sorĉon disdonas sen avaro:
parfumas ŝia stilo kvazaŭ rozo!

Jen estas ŝiaj versoj, ŝia prozo,
plezuro vera por la diletanto:
parfumas ŝia stilo kvazaŭ rozo!
Simon' BONJOLO: trafa debutanto! (*)

(*) En LAŬTE! N^o 99 (MAJO-JUNIO/1992^a)

ERGOTO DE BONAERO



La venonta numero aperos **meze de septembro**.
En ĝi vi povos legi la novan debaton per ĉenleteroj : **"Kiel pacigi niajn urbojn?"** La red.

Tutaj informoj Kaj petoj

PRI : "vinberrikoltista e-movado"

(vd. L:98, p.34-35-36)

Tute ne temas pri ĉiopova savorganizo por (eks-)orienteŭpanoj!

Ŝajnas al ni, ke multaj legantoj de "vinberrikoltista Esp-movado" miskomprenis la enhavon de tiu ĉi artikolo, eble pro la titolo tute majuskligita.

Ni aperigis tiun ĉi anoncon por trovi 1-2 esp-istojn el franc-lingvio, kiu pretos anstataŭi nin en malgranda bieno dum maksimume 10 tagoj kaj nur post eltrovo de tiu(j) esperantisto(j), ni intencis memtrovi 1 (aŭ eĉ maksimume 2 personojn) el ne-franclingvio.

Sed kia katastrofo! Supozeble iuj laŭte-legantoj informadis ne komplete kaj miskomprenante al orienteŭropanoj, ĉar senĉese alvenadas leteroj el Rusio, Siberio, Ĉeĥoslovakio...ktp, kiuj komenciĝas per "Attestimataj...", en kiuj homoj esprimas sian fortan deziron aliĝi al V.E.M. (!?)* kaj finiĝas per "se vi sendos invitilon tuj al ni, ni estos tre dankemaj!"

Ni absolute ne estas ĉiopovaj sanktuloj! Aliflanke, kiu bienestro volas kaj aŭdacas ne nepre neĉese dungi tiom da ekster-eŭropkomunumanoj, tio signifas kontraŭleĝe!?

Bone relegu la artikolon, ni petas! antaŭ ol informi orienteŭropanojn! Ĉiaokaze interesatoj - ĉefe pro mono - jam tro blinde abundas. Bedaŭrinde, mona mondo ne estas tiel malavara kaj tial ni devus solvi problemon nur konstruante amik-ecan rondon kune.

Sed ne nur pere de riĉlandanoj. Kaj "riĉlandanoj" ne signifas nur "riĉuloj"n.

Ni skribis tiun artikolon nur kiel proponon al vinberrikolt-emul(in)o(j) el franclingvio.

vinberrikoltistoj (sed ne membroj de VEM!)

* VEM : tia organizo ne fondiĝis kaj eble ne fondiĝos, se socia sistemo absolute neŝanĝiĝos... kaj pri tio ni ne havas grandan revon.

PLIBONIGI LA INSTRUADON DE ESPERANTO...

(Relegu la samtitolan artikolon en L:99, p.21)

Posedi amplekŝan vort-provizon kaj bone mastri la gramatikajn strukturojn ja necesas, sed ne sufiĉas, por scipovi fremdan lingvon : necesas ankaŭ akiri la kapablon uzi siajn lingvajn konojn por trafe kaj flue esprimi proprajn opiniojn, sentojn, pensojn, kaj sukcesi adaptiĝi lingve al la diversaj situacioj, kiuj povas prezentiĝi.

Alivorte, la celo de la lernado estas ne nur la akiro de lingva kompetenteco, sed ankaŭ de **komunika kompetenteco**.

En Esperanto, la lingva kompetenteco estas relative facile akirebla pro la reguleco kaj fleksebleco de la lingvo; kaj ankaŭ ĉar nur ĝin oni instruas, almenaŭ en la granda plimulto de la lernolibroj.

Tamen la kapablo komuniki estas almenaŭ same grava, ĉar sen ĝi, la lingvaj konoj restas vanaj.

Oni povas pensi, ke iu, kiu kapablas diri frazojn gramatike senerarajn (sed kun enhavo nula), ankaŭ povos, per la sama lingva materialo, diri ĉion, kion li volos.

En la realo, tiu ĉi opinio estas grandparte falsa : oni trejniĝas paroli nur kiam oni efektive parolas, kiam oni esprimas primas peton, senton, opinion..., ne kiam oni funkciigas malplenajn gramatikajn strukturojn.

Multaj eble diros, ke ili lernis per tradicia gramatika metodo kaj nun posedas la lingvon kaj sukcesas komuniki kontentige en multaj situacioj.

Jes, sed la malplenen, kiu ekzistis, kaj plu ekzistas, en la tradiciaj metodoj, ili simple mem plenigis per propraj, cetere neanstataŭigeblaj, spertoj : partopreno en klubaj konversacioj, en diskutoj, en kongresoj, korespondado, rilatoj kun eksterlandanoj, legado... Nepre iumaniere ili uzis Esperanton kiel vivantan ilon kaj tiel akiris komunikan kompetentecon.

Ili do elturniĝis, kaj aliaj povos elturniĝi same.

Sed kial ne jam de la komenco lerni la lingvon en rilato kun ĝia reala uzo? Kial ne bazi la instruadon sur komunikaj situacioj kaj tiel igi la lernadon de frazoj, esprimoj, vortoj, gramatiko, pli stimula kaj tuj utiligebla? Krome, ŝajnas al

mi, ke ju pli oni havas okazon paroli pri propraj ideoj, ŝatoj, intereso, des pli oni emas paroli. Ĉar, eĉ por lerni lingvon, kiu emas paroli por nenion diri?

Tiujn ĉi ideojn ni intencas pridiskuti kaj konkrete elprovi kun la helpo de lernantoj dum la staĝo ĉe Isabelle JACOB, fine de Julio.

Bonvenon al la interesatoj!

Katrin'

Memorige : Interesatoj sin turnu al Isabelle JACOB (tel.55 03 54 76) aŭ al : Esperanto, F-47470 BEAUVILLE (tel. 53 95 40 26). La staĝo okazos apud Limoĝo, ĉe jena adreso : Isabelle JACOB, Pomarbo, Les Monneries, F-87200 SAINT BRICE

La internacia ekologia komuno **EKOLONIO** en HENNEZEL proponas internacian semajnon

en sia bieno de Hennezel, centre de arbaro en Vogezoj, inter Contrexeville, Epinal, Plombières, de la 22a ĝis la 29a de aŭgusto 1992, kun staĝoj de esperanto por komencantoj kaj progresantoj, kursoj pri naturo, ekologio, migrado en arbaro, al kelkaj lokoj, kasteloj k.a....

Instruos esperanton : S-ro Modesto RAMELLI.

Ĉiutage, de la 9a ĝis la 11a : kursoj.

Posttagmeze : migrado aŭ ekskursoj.

Vespere : Distraj diskutoj, kantoj, lumbildoj ktp.

Aliĝu antaŭ la 15a de aŭgusto al :

Centre Ecologique International, F-88260 HENNEZEL.

Tel.-n-ro : 2907 0027 (buroo) aŭ 2907 0112.

Por ĉiuj pliaj informoj (kosto de la restado...) peti laŭ la ĉi-supraj indikoj.

MONDA HUMANISMO

La sekretario de la Internacia Humanisma kaj Etika Unuiĝo (Oudkerkhof 11, NL 3512 GH UTRECHT) ĵus eldonis faldfolio-
lion por informi pri siaj principaro, celoj, aktivaĵoj kaj la listo de la kunligitaj naciaj asocioj. Por ricevi tiun interesan dokumenton sin turni al la ĉi-supra adreso.

Gérant & imprimeur : Baudé, F. 47470 Beauville. CPPAP 58651

alla Turismo al alla Mondo



L'AMIKEGA RETO

92-93

Vojaĝi? Jes, sed kiel?

Vi lernis Esperanton por intimiĝi kun aliaj mondanoj. Malŝelate, vi ne scias kiel tion realigi. Ekster la kongresoj, vi ne scias kion fari por ligi firmajn kontaktojn kun alilandaj samideanoj.

L'AMIKECA RETO estas organizo, kies celo estas ebligi tiaspeciajn amikecajn rilatojn. Ĝi celas fundajn neordinarajn vizitojn, nekutimajn aktivaĵojn aŭ diskutojn.

L'AMIKECA RETO iras tien, kien la ordinariaj turistoj ne iras mem, ĉar mankas al ili la lingvo de la amikeco, la Zamenhofa...

Vi aĉetu la gvidlibron 1992-1993 per 50 F.F aŭ ekvivalento, (aŭ 15 IRK) aŭ per ia sjan rimedo...

Postkonto: Rollin; N° 1544 95 V; ĝircentro: La Source (F)
Adreso: Amikeca Reto; 88 rue Victor Hugo

F- 37 400 - AMBOISE (Francio) Tel: 47-57-55-63